FN PER ANC 47

# ★ Normanda Esperanto Bulteno ★

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO N° I4

- NOVEMBRO I970 -

---

Redaktas : S-ro E. JOUIS - 62I Rue GEORGES MUGNIER - 76 BOISGUILLAUME

Sendu la manuskriptojn antaŭ la IO-a de [illegible]ro , IO-a de Majo IO-a de Aŭgusto , IO-a de Novembro.

---

E N H A V O.


- Esperaj vortoj
- Kiel varbi novajn lernantojn?
- Franca - Germana renkontiĝo en Amiens.
- Eta bankedo, okaze de la Zamenhof tago.
- Junulara rubriko.
- Federacia Kongreso en Mantes la Ville ( 24a,25a, 4, I97I )
- S.A.T.Amikara Kongreso en Yvetot ( Pasko I97I )
- Esperanto ĉe B.B.C.
- Vivo de la Grupoj.
- Naskiĝo.
- Anoncetoj.
- Kotizoj kaj abonoj.


---

## E S P E R A J V O R T O J ....

Unu el la roloj de iu ajn prezidanto estas paroli ...Do, laŭ la kutimo, mi tuj diros al vi kelkajn vortojn. Sed, ne forgesu ke la prezidanto de l'Unuiĝo Normanda de Esperanto estas nur ano inter la aliaj ĉar l'Unuiĝo estas ĉies afero.

Dum la finiĝa jaro, Esperanto, en nia regiono, ne " disvastiĝas kvazaŭ oleo-makulo", tamen, nia diligenta kolegaro laboris.

Bedaŭrinde, multaj grupestroj neglektas informi la redaktanton de la Bulteno pri siaj agoj; sed, verdire, ke ili efektive laboras estas ja la ĉefa afero.

Mi volus, hodiaŭ, inter aliaj, paroli pri dû imponaj ekspozicio kiuj okazis en Septembro en Havro kaj Yvetot. Kial tiu elekto? Simple ĉar, laŭ mi, ni tro malofte turnas nin al la " Granda Publiko ".

Sendube, vi povos legi en tiu-ĉi numero de la Bulteno artikolojn pri tiuj - al neesperantistoj dediĉitaj - aperigoj, sed mi deziras rimarkigi ke, nun, la oficialuloj rigardas nin kiel seriozulojn!

En Yvetot, la Urbestro mem S-ro Bobée inaŭgiris l'ekspozicion, Tie pluraj centoj da vizitantoj.

En Havro, oficiale malfermis la ekspozicion, kiu okazis en la Honora Salono de la Urbodomo, S-ro COLLIARD, vicurbestro; tri aliaj vicurbestroj kaj pluraj urbkonsilantoj ĉeestis. Pli ol mil vizitantoj!

Kompreneble, la lokaj gazetoj raportis pri tiuj aferoj. Tiuokaze mi volas danki la gazetaron kiu povas multe por la disvastiĝo de nia movado. Sed, miaj ĉefaj dankoj iros al ĉiuj, kiuj ebligis tiujn ekspozicion, prutedonante dokumentojn - ofte multvalorajn, ĉiam karajn al la koroj -, malavare donante sian tempon. La diverseco de la deveno de la dokumentoj estas doninta - sed por ni, ne estis necese - vivantan pruvon ke l'Unuiĝo Normanda ne estas revo sed realaĵo.

Sed, mi ne devas luli nin per iluzioj: longa estas la vojo al la venko! Evento esperantista devas okazi plej ofte. Kaj, skribante tion, mi pensas ke, de nun, ni devas zorgi pri la proksima regiona Kongreso de nia Unuiĝo. Kiu urbo akceptos la laboron, sed ankoraŭ la honoron organizi la Kongreson.?

Same kiel niaj veteranoj, ni konservas nian firman fidon en Esperanto. Tial, kun ega espero ..., ni komencas la Novan Jaron.

Je la nomo de la estraro de l'Unuiĝo Normanda de Esperanto, mi deziras al vi ĉiuj

S A N O N - A G R A B L A N K R I S T N A S K O N -

F E L I Ĉ A N N O V J A R O N ! !

Maurice HUET.
Prez. de U.N.E.

o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o

## GRAVA ATENTIGO AL LA GRUPESTROJ KAJ DELEGITOJ DE U.E.A.

Ĉar la demandaroj de U.F.E. pri la aktiveco de la grupoj kaj delegitoj, pro diversaj kialoj prokrastiĝis en sia vojo, bonvolu ne atendi, kaj tuj resendi ilin plenigitaj al:

Sinjorino J. Vincent
Rue des Oiseaux. - 27 - LES ANDELYS.

Antaŭan Dankon!

## KIEL VARBI NOVAJN LERNANTOJN?

En mia pasinta numero, mi promesis verki serion da artikoloj pri tiu temo. Hodiaŭ mi pritraktos unu el la plej simplaj propagandmanieroj : La artikolojn en la lokaj ĵurnaloj.

Tiu propagandmaniero havas grandan avantaĵon; krom se oni publikigas anonceton, ĝi estas senpaga. Kompreneble, la ĵurnalistoj ne estas devigataj publikigi ĉion kion oni donas al ili, sed, se oni lerte agas oni preskaŭ ĉiam sukcesas aperigi artikolon. Efektive, ĉio kio koncernas la lokan vivon estas plezure akceptata de la loka gazetaro, kondiĉe ke ĝi ne konsistu el propagando, sed el vera informado. Oni do povas anonci antaŭe kunvenojn de la grupo, kun la programo, kaj raporti poste pri ili. Se iu kunveno estas grava aŭ havas iom specialan karakteron, oni eĉ povas inviti ĵurnalistojn, kiuj mem verkos artikolon poste. Ciu okazaĵo povas esti uzata : Ekspozicio, informa vespero, malfermo de kurso, festo en la grupo, renkontiĝo kun aliaj grupoj, vizito de eksterlandano, rezulto de ekzamenoj, partopreno de loka Esperantisto en Internacia Kongreso, k,t,p. Oni neniam devas preterlasi okazon publikigi artikolon : tio montras ke Esperanto vivas, kaj tio ankaŭ vekas iom post iom intereson al ĝi " Sed, eble vi diros, en mia urbo ne estas grupo ", do mi ne povas trovi okazojn uzi la gazetaron. ! Eĉ en tiu kazo oni povas verki artikolon. Por tio sufiĉas organizi renkontiĝon de 2 aliurbaj-grupoj kaj anonci ĝin, aŭ ankaŭ fariĝi delegito de U.E.A. kaj klarigi kio estas delegito de U.E.A., kaj ke li ankaŭ netas siN senpage je la dispono de la tuta loĝantaro por fari servojn per Esperanto

Do ĉiam estas eble fari trafan informlaboron pri Esperanto en la loka gazetaro. Uzu tiun rimedon kiel plej eble ofte!!!

P. Pottier ( Yvetot. )

---

## FRANCA - GERMANA Renkontiĝo en AMIENS, la IIa de Oktobro

Okaze de la IOa datreveno de la ĝemeliĝo de Amiens kaj Dortmund, la Germanoj renkontis siajn Francajn amikojn. El Dortmund ne venis nur germanlingvaj sed ankaŭ proksimume deko da Esperantlingvaj geamikoj.

Je la 9a kaj 30, la unuaj esperantistoj alvenis kaj babiladis kune antaŭe de la kultur-domo. Inter ili; oni povis noti la ĉeestanton de S-ro KEUNING, Prezidanto de la Dortmunda grupo, eksurbestro de Dortmund kaj ankaŭ kreinto de la ĝemeliĝo de Amiens kaj Dortmund. S-ro Doujac Prezidanto de la Amiena grupo ĉeestis, kaj oni ankaŭ povis vidi esperantistojn el Valenciennes, Roubaix - Tourcoing, kin mem el Yvetot, k, t; p

Je la IOa, ni eniris en la Teatran-ĉambron de la Kulturdomo kie orkestro de Amiens ludis, kaj poste, la urbestroj el Amiens kaj Dortmund paroladis.

Estis la I2akaj30 kian la 50 gesamideanoj eniris en la restoracion kie la menuoj esperantlingve presitaj malsatigis nin. Sed unue, ni trinkis honoraperitivon ofertitan de la Prezidanto de la Amiena Grupo. Bedaŭrinde S-ro KEUNING ne povis partopreni la bankedon pro oficiala aferoj.

Post bona manĝado, ni partoprenis la distran parton Germana amiko Prezentis lumbildojn pri sia regiono, Sinjorino KURZ ludis gitaron, ni kantis, kaj kelkaj amikoj rakontis historietojn, ĉiam en tre gaja etoso

Tiel, la tempo por foriri alvenis tre rapide, kaj ni adiaŭis niajn geamikojn konservante agrablan memoraĵon pri tiu tre amika renkontiĝo.

Johano Leroux.

nnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnnn

## J U N U L A R A   R U B R I K O.

### - GRAVA ALVOKO.-

Vi tre certe konscias ke la nova generacio da Esperantistoj estas la estontoco mem de la movado por enkonduki Esperanton en la ĉiutagan vivon.

Bedaŭrinde, ĝis nun, esperanto vegetas precipe en nia regiono " Unuiĝo estas forto." diras proverbo.

Kial ne unuigi la diversajn normandajn gejunulojn?

Tre certe la unuopaj junaj esperantist(ino)oj havas ideojn, sugestojn, proponojn por vivigi nian lingvon en nia regiono, Normandio.

Sed ni ne havas ĝustanjunuladresaron por kontaktiĝi kun ili; ĉar ili plej parte ne estas nonbroj de esperanto-asocioj.

Por malaperigi tiun ĝenan situacion, ni sugestas ke :

- ĉiu izolita junul(in)o,
- ĉiu gvidanto de publika aŭ perkoresponda kurso,
- ĉiu respodeculo de esperanto- societo,

sendu al la ĉisuba adreso, nomon, adreson, kaj se eble aĝon kaj profesion de ĉiu juna esperantist(in)o de li konata( Por fiksi aĝlimon ni diru ĝis 30 jaraĝaj esp.)

Samtempe, ne forgesu sendi vian opinion pri la farotaj agadoj ĉu en la esp. movado mem, ĉu ekster nia rondo; kiamaniere vi opinias kunligi la gejunulojn ĉu dum kongresetoj regionaj, ĉu dum pli

oftaj renkontiĝoj : semajnfinoj, aŭ pere de cirkulantaj leteroj, speciala rubriko en nia gazeto " Normanda Bulteno " pri kio vi deziras diskuti, pristudi k; t. p...

Ni atendas viajn leterojn, poŝtkartojn kaj...eĉ viajn telegramojn.

Skribu al Pierre LEMARCHAND, 43 rue de Lessard,76 - ROUEN.

P. LEMARCHAND.

mmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmm

## D I V E R S A J   K O N G R E S O J.

Kongreso de la Normanda Federacio komune kun la Pariza Federacio en MANTES la VILLE ( 24an - 25an de Aprilo 1971.)

MI ALVOKAS ĈIUJN ESPERANTISTOJN EL LA NORMANDIO KAJ EL LA PARIZA REGIONO POR AMASE PARTOPRENI , EN FRATA SPIRITO.

Mi deziras ke tiu kongreso, sub la Honora Protekto de la Senatano Urbestro de Mantes la Ville kaj mi pensas de aliaj Aŭtoritatuloj, ne faru bruon sed BRUEGON. Multnombraj alvenoj faciligos nian laboron ( La diversaj ĵurnaloj certe parolos pri tiu evento en Mantes la Ville) mi tionasertas

Do la Kongreso okazos en la Urbodomo de Mantes la Mille .

Jen provizora programo.

Sabato :

Akceptado de la Kongresistoj en la Urbodomo....( Kiel la Dimanĉo matene, sendube veturiloj atendos la kongresanojn en la fervoja stacidomo je la horoj de la ĉefaj trajnoj.

Postagmeze : Publika ekspozicio en la Urbodomo (Libroj, Revuoj., Diskoj., Poŝtmarkoj.)

Vizito de la Urbo

Vespere: Komuna vespermanĝo en Mantes la Jolie

- Postmanĝe ni esperas organizi distran vesperon kun projekcio da turismaj filmoj.

Dimanĉe - Je la 9a kaj duono: Malfermo de la kongreso kaj akceptado de la Aŭtoritatuloj.

- Komuna tagmanĝo en bona restoracio de Mantes la Jolie ( 18 Frs. pliĝ nur trinkaĵo.)

Posttagmeze : Mi esperas organizi distran posttagmezon kun artistoj el Parizo sed tio ne sufiĉas, ĉu en Normandio estas inter niaj geamikoj unu aŭ pluraj kantistoj, ĥoro aŭ ....?

Ĉu Sabato, ĉu dimanĉe okazos ekzamenoj, ( laŭ la demandoj.)

Jen niaj projektoj, Ne ankoraŭ punkte sed baldaŭ mi tion esperas.

S-ro CHAMPS.

...00000...

## K O N G R E S O  D E  S . A . T . A M I K A R O

Yvetot. ( IO a ĝis I3 de Aprilo I97I)

Aliĝprejoj: ĝis la 3I - I - I97I : Membro I4 Frs   Gasto 22Frs
poŝt la 3I - I - I97I : Membro I6 Frs   Gasto 27Frs
Infano malpli ol I5 jara ne pagas
Junulo de I5 ĝis 20 pagas duonan kotizon.

Provizora programo.

Krom la laborkunsidoj okazos 2 ditraj vesperoj kaj 2 ekskursoj tra la regiono.

Tiuj kiuj deziras deziras aliĝilon bonvolu skribi al S-ino POTTIER C. 50 Residence Fief de Caux - 76-Yvetot.

JAM HAVEBLAJ

Rondaj kiel nia mondo
Flavaj kiel Normanda
Butero

La glumarkoj de S.A.T.Amikaro
po 20 por 2Fr + sendkosto
Mendu ilin amase al nia kasisto/ Sro Saunier Bernard
LOUVETOT. 76 - CAUDEBEC en CAUX.

mmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmm

## ESPERANTO ĈE B.B.C.

Sinjoro Mc LENNAN, el EXETER ( Britujo), kiu pasigis agrablan libertempon ĉe Sro LEGRET, en Vire ( Calvados) lastan jaron, skribas al ni ke li rimarkis la alvokon en la B-no I3 pri la demando de uzado de Esperanto ĉe la B.B.C. Li konsilas tio.

I/ - Uzu la francan lingvon, aŭ la esperantan, sed absolute ne la anglan.

2/ - Skribu peton kiu postulas respondon.

3/ - Tamen, ne argumentu pri la valoro de Esperanto, ĉar la B.B.C. jam multe legis pri tio. Sed, ekz. demandu: " Kial vi ne uzas Esperanton en viaj elsendoj?, aŭ Kian vi dissendos programojn en Esperanto" ( aŭ pri esperanto)

mmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmm

## A T E N T U ! ! !

Ĉu via grupo petis subvencion por la nova Jaro?

- NEPRE NE FORGESU -?

Estas la momento por peti ĝin al via urbestro !

# V I V O  D E  L A  G R U P O J .

LES ANDELYS

Esperanto Kursoj

I/ Lunde, Marde, Merkrede, Vendrede, Sabate de la 8-a ĝis la 8a kaj duono, duagrada kurso en la lernejo ( 2 knabinoj IO jaraj.)
Libro " Por la Praktikantoj ", de P. BADIN

2/ Marde de la I8,30 ĝis la I9,30: Duagrada kurso en la lernejo ( 4 lernantinoj I2 ĝis 44 jaraj.) Sama libro

3/ Vendrede de la I8-a ĝis la I9-a : Unuagrada kurso en la Junuldomo ( 5 gelernantoj. I4 ĝis 42-jaraj.) Cseh - metodo

4/ La duan sabaton de la monato, de la I4- ĝis la I5-a : Konversacia kurso en la lernejo ( por ĉiuj gelernantoj). Oni debatas pri antaŭ-elektita temo.

S-ino Vincent.

SOTTEVILLE les ROUEN

La Esperanto grupo de la ruena regiono eldormiĝis post la someraj libertempoj. Ekspozicioj en la junuldomo se Sotteville les Rouen kaj en la lernejo Salengro en Grand Quevilly estis organizitaj komence de Novembro. Tie ni prezentis dank'al pli ol tri cent diversaj libroj kaj broŝuroj, diskoj, turismaj prospektoj, gazetoj...al la neesperantista publiko, la disvastigon de la Internacia lingvo.

Post prelegetoj la ĉeestantaroj povis ricevi informojn pri la organizado de la Esperanto movado kaj pri ĝiaj atingoj en ĉiuj fakoj de la nuntempa vivo.

En Grand Quevilly, Petro Quillaud jam komencis lernigi nian lingvon al deko da gelernantoj. Tiu kurso estas organizata de la loka Laika Amikaro. S-ino Lamy, Profesorino pri ekonomio en la teknika liceo Gustave Flaubert de Rouen tre baldaŭ gvidos kurson por siaj dek du gelerna ntoj. S-ro Senet atendas pozitivajn reagojn post nia agado en la Junuldomo de Sotteville, por komenci prizorgi, ĉu perkorespondan, ĉu parolan kurson. Do, ni esperas, ke tiuj malfermoj de diversaj kursoj vivantigos esperanton en nia ruena regiono.

Bonvolu noti ke la venonta kunveno de la grupo okazos : Vendredon la 4an de Decembro en la Kutima ejo de la Grupo : malnova lernejo Renan, strato Marion, Sotteville les Rouen, precize je 20H45.

Petro LEMARCHAND.

- YVETOT

Al la rezultoj de la ekzamenoj anoncitaj en la pasinta numero, ni devas aldoni la sukceson de S-ro SAUNIER Bernard en la ATESTO pri KAPABLECO.

La 4an de Oktobro okazis grava ekspozicio anoncita per la ĵurnaloj, per afiŝoj, 700 flugfolioj sur la aŭtomobiloj kaj eĉ per laŭtparoliloj, 250 personoj vizitis ĝin kun intereso.

Ĉi-jare estas kurso por komencantoj (8), duagradaj kursoj (4+2), konverciaj vesperoj, kaj preparado al la Kapableco (2 ). Plie estas kunveno La Ian sabaton de ĉiu monato, je la 20a kaj 45.

Nederlandaj geamikoj vizitis nin en Septembro

Plie, I Yvetotano partoprenis la Internacian Kongreson en Vieno kaj Ausbourg; unu alia libertempis ĉe Nederlanda amikino

Bona rememoro restas al ĉiuj.

La 7an de Novembro, okazis la Ĝenerala Kunveno, kaj disdono de la Diplomoj kaj Premioj.

Cetere, la grupo aktive preparas la Kongreson de S.A.T.Amikaro okazonta je venonta Pasko.

POTTIER Petro.

- FECAMP.-

Nenio nova

Sinjoro Permanne restante tute sola, esperas ke dum la estonteco la grupo revekiĝos.

Kurso daŭras : I lernanto ( duagrada kurso )

PERMANNE Ernesto.

- VIRE.-

La Turisma Oficejo en VIRE afable sendas propagandilojn por tiu agrabla regiono, kaj aldonas la esperantan tradukon se oni petas ĝin.

- LE- HAVRE.-

De la 4a ĝis la 7a de Oktobro, la grupo organizis grandan ekspozicion en la enirhalo de la Urbodomo, laŭ la temo "ESPERANTO EN FRANCUJO KAJ EN LA MONDO " Tiu ekspozicio estis inaŭgurita sub la prezido de S-ro COLLIARD, vicurbestro, kiu substrekis la intereson de la internacia lingvo" kiu povas vere proksimigi la homojn unujn al la aliaj, kiam ili sukcesas kompreniĝi reciproke " S-ro HUET, Prezidanto de U.N.E. dankis la vicurbestron kaj ankaŭ akcentis la utilecon kaj neceson de Esperanto.

Entute ĉirkaŭ I.000 personoj vizitis la ekspozicion, kaj ofte ne

kaŝis sian intereson.

Iom poste malfermiĝis la novajn kursojn.
- Unuagrada Kurso, gvidata de S-ino Gontard : 4 lernantoj.
- Duagrada Kurso, gvidata de S-ino Lavallée : 3 lernantoj.
- Perfektiga konversacia kurso, gvidata de S-ino Colleu : 7 lernantoj.

Fine de Septembro okazis la Ĝenerala Kunveno de la Grupo, dum kiu oni renoviĝis la estraron, kies prezidantino nun restas S-ino Peltier Sekretariino S-ino Turmel kaj Kasistino S-ino Gontard. Poste ni disdonis la diplomojn al la laŭreatoj de la ĉi-jaraj ekzamenoj.

La grupo, de bone funkcias, kaj oni ec asertas ke ĝia Prezidantino baldaŭ anoncos novajn projektojn....

S-ino Colleu M.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

## - K O T I Z O J -

### ĈU VI PAGIS VIAN KOTIZON 1971 ?

Pri la prezoj kaj poŝtĉekkontoj, vidu la bultenon N° 13a.

Se vi deziras aliĝi al U.E.A., nepre sendu vian kotizon ( prefere pere de la grupa kasisto, kiu grupigos ĉiujn kotizojn) al la kasistino de la Normanda Federacio, S-ino Vincent, Rue des Oiseaux - 27 Les Andelys ( C.C.P. Federation Normande des Centres Culturels Esperanto - Rouen 2348 - 06 Z ) Se vi sendus vian kotizon rekte al U.F.E., ĝi revenus al la Federacia kasistino poste. Do, evitu al U.F.E., neutilan laboron. Dankon!!

ABONOJ : La Federacio ankaŭ perasabonojn al diversaj revuoj.

??????????????????????????????????????????????????????????????????????

### ĈU ĈIU BULTENO PLAĈAS AL VI ?

-----Se ne, bonvolu sendi sugestojn por plibonigi ĝin.
------ Se jes, varbu novajn abonantojn.

Ĝi kostas nur 2 frankojn jare!

Poŝtĉekkonto : Union des Esperantistes de Normandie
ROUEN N° 283 - 40 E

---

NE FORGESU!!!!!

Ciujn raportojn aŭ artikolon por la venonta numero bonvolu sendi antaŭ la 10 a de FEBRUARO 1971

NE ATENDU REMEMORIGAN LETERON. DANKON!

## - NASKIĜ - ANONCO -

La Kultura Centro de Yvetot havas la plezuron anonci la naskiĝojn de

Nathalie HEBERT
Bruno FERCOQ.

Ni gratulas la Gepatrojn kaj deziras al la beboj sanon kaj feliĉon por lia tuta vivo.

-----------------

## - ANONCETOJ. -

Se iu Esperantisto deziras foĵeti sian televid-aparaton aù transistoron, li bonvolu skribi al

FOYER RURAL de LOUVETOT.
76 - CAUDEBEC en CAUX.

kiu urĝe bezonas ilin por sia junularo.

EGAN DANKON


Ĉu vi bezonas ion,? Ĉu vi deziras vendi ion ?

Ĉu vi serĉas ion? Ĉu vi deziras korespondi? aù kontakti malvovajn amikojn netroveblaj? Do, sendu vian anoncon al la ĵurnal-adreso!

Ni povos aperigi vian adreson sub via anonco, sed se vi tute ne deziras tion, ni metos nur numeron kaj sinsekve la adreson de la ĵurnalo.

Atentu, tiuj anoncoj estas senpagaj.

--------------------




- DEPOT LEGAL 4em TRIM. 70
LaG Gerante Mme POTTIER

Polycopié par le Centre Culturel
d' Esperanto d'Yvetot.

# K O M U N A   E T A   B A N K E D O

Kien vi iros la I3an de Decembro?

Okaze de la IIIa datreveno de la naskiĝo de la kreinto de Esperanto, D-ro ZAMENHOF, ni invitas esperantistojn partopreni al eta bankedokiu okazos , dimanĉe tagmeze, la I3an de Decembro I970,en la " Hotelo de la Gare de Barentin" sur la R.N. I3bis, tre konata de la transportistoj. Ĝi estas facile atingebla fervoje kaj aŭtomobile, tiel multaj Normandoj povos ĉeesti. Komprenble, ju pli ni estos des pli la etoso estos agrabla.

La prezo de la manĝo estos ĉirkaŭe je I3 Frs, ĉio entenata krom la kafo.

Tuj post la manĝado, en la Hotelo mem, ni distriĝos inter ni kaj al ĉiuj mi petas alporti esperantistajn kantojn kaj eĉ prepari skeĉojn aŭ agrablajn ludojn.

Bonvolu sendi rekte la ĉi-kunan aliĝilon al ĉi suba adreso antaŭ la 5a de Decembro ĉar aliamaniere la hotelisto ne povas certigi akcepti la personojn ne anoncintajn sin

Sinjoro SAUNIER Bernard

LOUVETOT - 76 CAUDEBEC EN CAUX

!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!!

" A L I Ĝ I L O   A L   L A   B A N K E D O "

La I3an de Decembro je la I2a Horo

HOTEL DE LA GARE - 76 - BARENTIN.

Ni estos...............personoj

a) Ĉar ni bezonas scii la ekzaktan nombron de la partoprenontoj bonvolu firme anonci vian venon.

b) Ni alportos ( Kantojn, diskojn, ludojn, kart-ludojn,rakontojn, amuzaĵojn, k,t,p.)

Sendi kiel eble plej rapide kaj nepre antaŭ la 5a de Decembro tiun aliĝilon al:

Sinjoro Saunier Bernard

LOUVETOT - 76 CAUDEBEC EN CAUX.

Venu amase!!!!!!!!